Numero sesa. Vendredon 12-an de aŭgusto

# Kongresa Sciulo

Kongresa Kuriero de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto



## Bonvolu surmeti maskon

Jam pruviĝis kelkaj kazoj de KOVIM-19 (COVID-19) inter la partoprenantoj de la Universala Kongreso. Tial ni denove instigas ĉiujn surhavi maskon en internaj lokoj, por limigi pluan disvastigon. Kaj ankaŭ certigi ke vi povos reflugi hejmen.

## ♫ La junuloj faris en konsento unu grandan rondon ekskursan ♫

*La plej granda, plej ekscita amuzparko de Kebekio,* La Ronde, gastigis 22 partoprenantojn de la Junulara Programo, merkredon, sub la lerta gvidado de Kamila Koziej-Lévesque. La vizitantoj ĝuis kaj amuzajn kaj timigajn veturojn kiel la Boomerang (Bumerango), la Goliath (Goliato), la Splash (la Plaŭdo) kaj la Orbite (Orbito). La parko situas ĉe la insulo Sainte-Hélène, meze de la rivero Sankta-Laŭrenco kaj havas multajn vidpunktojn super la veturoj — antaŭ ol oni rapide falas al la tero! Certe, ni venis, ni vidis, ni multe vicis, sed ankaŭ ni ege amuziĝis.
\Aleks



## Rezultoj de la Internacia Novela Konkurso




Unua premio: *Amo en la tempoj de kovimo,* Rafael Nogueras

Dua premio: *La sekreta recepto,* James Bridge

Dua premio: *Ĉu ne pli bone hejme?* Rafael Nogueras

Tria premio: *La tricenttrideksepa tago,* Sten Johansson

Tria premio: *La brakumklubo,* Martin Rue.

### Songĝkaptiloj

Infanoj kaj gepatroj de la IIK preparis songĝkaptilojn, por lerni pri la uzo de tiu objekto ĉe pluraj indiĝenaj popoloj de Ameriko.



# Kelkaj faktoj pri pucino

Dum la lastaj jardekoj disvatiĝis tra kebekiaj rapidmanĝejoj nova plado, la tiel nomata pucino. Neniu vere scias kiu unue kreis ĝin, sed oni ĝenerale kredas, ke ĝi venas de loko apud Victoriaville, kaj ĝi disradiis el tiu loko. Baze temas pri terpomfritoj sur kiujn oni aldonas *brunan saŭcon* (faritan el buljono, faruno, maizamelo kaj acersiropo) kaj freŝan ĉedaron — tre freŝan, prefere aĝan de malpli ol tago, por ke ĝi havu la deziratan elastecon. La varmeco de la fritoj kaj saŭco moligas la fromaĝon, ĝis la tuto iĝas preskaŭ homogena.

Post tio, oni povas aldoni ĉiajn ingrediencojn. Diversaj viandoj kaj tomata saŭco estas oftaj aldonaĵoj. Iu fama restoraciestro eĉ ofertas luksan varion kun *foie gras* (grashepataĵo de anaso)!

Normala pucino kostas dekon da dolaroj kaj enhavas inter 500 kaj 1100 kilokalorioj (2100 kaj 4600 kJ). Tiu kun *foie gras* tamen kostas 31 dolarojn!



Pucino el restoracio La Banquise, kiu ofertas pli ol 30 varioj!

*Kongresa Sciulo* estas la kongresa kuriero de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, en Montrealo, Kebekio, Kanado, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto de 2022. Redaktas Sylvain Auclair. Redaktejo: ĉambro Milojević, Université du Québec à Montréal, DS-R340. Nova numero aperas ĉiumatene (krom en merkredo). Eblas elŝuti koloran version per apo trovebla je uk2022.glideapp.io. Kontribuojn (tekstojn kaj fotojn) sendu al jrsylvain.auclair (ĉe) gmail.com.

© Universala Esperanto-Asocio, 2022.

Dépots légaux: Bibliothèque nationale du Québec et Biblothèque nationale du Canada, troisième trimestre, 2022.

# Aŭtunaj AMO-seminarioj

Dum aŭtuno okazos du AMO-seminarioj. Aktivula Maturigo (AMO) kaj rilataj seminarioj estas projekto de UEA por kapabligo de gvidantoj de Esperanto-movado kaj diskutigo de landa kaj faka agado.

• AMO 94: Arkivado kaj kolektado de esperantaĵoj, Triesto, Italio 2022.10.28.-30.

Ĉeforganizantoj: Triesta E-Asocio kunlabore kun ELF/AREK (Esperanto-Ligo Filatelista - Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj). Informoj: testudo.ts@gmail.com.

•AMO 95: Vortarfarado (kadre de la 7-a Memorialo Lucija Borčić), Zagrebo, Kroatio 2022.11.11-14.

Ĉeforganizanto: Kroata Esperantista-Unuiĝo. Informoj: hes.keu@gmail.com.

Kunlige al la AMO-Seminario kaj 7-a Memorialo okazos la 6-a Tradukkonkurso "Lucija Borčić" kaj 3-a Foto-konkurso "Kroatio de via okulo" (informoj ĉe: Eventa servo, sekcio "anoncoj kaj konkursoj".

Ambaŭ seminarioj estas antaŭviditaj ĉeeste kaj virtuale. Sekvu informojn ĉe Eventa Servo.

Pri AMO-seminarioj: http://aktivulo.net/eo/amo

# Sabata programo

10:00-12:00 Solena fermo de la kongreso, *salono Zamenhof* (Teatro Imperial)

12:00-14:00 Libroservo (en la kongresejo, *salono Eichholz*)

Atentu ke la kongresejo (UQAM) **malfermiĝos nur je la 12:00.**

Atentu pri la limhoro por elregistriĝi de via hotelo. En plej multaj kazoj temas pri la 11:00 horo, tio signifas ke vi devas elregistriĝi de via hotelo antaŭ la solena fermo.

En plej multaj hoteloj ekzistas eblo senpage lasi la valizon post la elregistriĝo do provu uzu tiun ĉi eblon.

En la Salono Zamenhof ankaŭ estos eblo lasi la valizon por la tempo de la fermo. Ĉiuj valizoj nepre devas esti subskribitaj. Valizoj sen nomo ne estos akceptitaj.valizoj.

\LKK

# La scienca programo resume

Hodiaŭ (vendrede) okazos la tri lastaj IKU-prelegoj, kaj la konkluda kunveno — la Scienca Forumo. Entute okazis 15 prelegoj, ĉiuj estis hiblridaj kaj registitaj. Sep unu-horaj prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato kaj ok duonhoraj prelegoj de la Scienca Kafejo. Mezume partoprenis fizike 30-40 personoj, kaj ĉ. 10 defore. El la 15 prelegantoj 4 prelegis defore. Tri IKU-prelegoj havis daŭrigan AIS-prelegon: Spacteleskopoj (Wandel), Petrogeologio (Maja) kaj Akvo-kemio (Raola). En du el ili okazis AIS-ekzamenoj - ĉe Wandel ekzameniĝis 27 personoj, el ili 5 defore, preskaŭ ĉiuj tre sukcese. Ĉe Raola okazis praktika ekzameno — duafoje en la historio de IKU okazis praktika kurso — kun kemiaĵoj, testo-tuboj ktp. (la unua fojo estis en Lisbono, en la IKU-AIS kurso de Franĉesco Maŭrelli pri droneoj). Ĉe Raola testiĝis praktike 11 partoprenantoj. En la Libroservo furoris la IKU-libro kiu enhavas la tekstojn de ĉiuj prelgoj, entute 260 paĝoj, por speciala kongresa prezo de 21 CAD aŭ 15 eŭroj. Ankaŭ furoris kaj jam elĉepiĝis la nova 4-a eldono de la libro *Kosmo kaj Ni* de Galadi kaj Wandel (daŭre eblas rete mendi) kun la nova ĉapitro pri spacteleskopoj, kun la lastaj fotoj de teleskopo James Webb. Aldone al la scienca programo, sukcese okazis lunde hibrida Faka Forumo, dum kiu prezentis sin ĉ. 20 Fakaj Asocioj, la plimulto el ili defore. Fine mi dankas la teknikiston Calire por daŭra helpo sen kiu mi ne sukcesus efektivigi la hibridan sciencan programon.



Orlando Raola prelegas

\Amri Wandel

## Fondiĝis Unio Internacia de Advokatoj Esperantlingvaj

La fond-asembleo de UIAE sukcese okazis: unue, la kunordiganto, Miguel Faria de Bastos, klarigis la kialon de la estigo de nova asocio, surbaze de tio, ke juristeco estas kvalifiko kaj advokatado estas profesio. Krom la koincidaj celoj inter Internacia Jurista Esperanto-Asocio kaj UIAE, ĉi-lasta havas specifajn celojn, unu el kiuj estas la videbligo de Esperanto kaj de advokata Esperanto-asocio funkcianta Esperante antaŭ la neesperantlingvaj advokatoj. La statuto, post projekciado, estis unuanime aprobita. Ankaŭ unuanime estis elektita la estraro, konsistanta el: Miguel Faria de Bastos (prezidanto — Portugalio), Querino Neto (vicprezidanto — Brazilo), Graça Thuler (sekretario— Brazilo), Héctor Campos Grez (kasisto — Ĉilio), John Therrien Dale Jr (senofica estrarano — Usono) kaj Manuel Cristóvão (senofica estrarano — Angolo). Esprimiĝis la volo havi estontece privilegiitan interrilatiĝon kun IJEA (juristoj) kaj IKEF (komercistoj), pro la parta koincido de la celoj kaj pro la neceso de konsistigo de termina jura vortaro.

\Querino Neto

# Infana kongreseto

Merkrede ni iris al *La Ronde*. Kaj disiĝis en grupojn laŭ aĝo. Ni multe amuziĝis, iris sur plurajn rajdojn, tagmanĝis kaj havis glaciaĵon. Poste ni revenis per la metroo al IIKejo por vespermanĝo. Post mallonga ripozo al miaj lacaj piedoj, ni ekeliris denove al Muzeo McCord. Tie ili prezentis multajn fascinajn artifaktojn el la indiĝena prahistorio, de antaŭ la alveno de Eŭropanoj.





\Gregorio

# Tajĝiĉuano

Tajĝiĉuanon estas origine malnova ĉina luktoarto baziĝanta sur integra rego de korpo kaj menso. De tio estis evoluigitaj formoj, kiuj taŭgas al ĉiuj. Korpomezo solvas tensiojn kaj kontraŭstarojn ekde sia kerno per ekvilibrigoj.

Ĉu tajĝiĉuano estas *paca batalanto* flanke de Esperanto en kampo nelingva kaj persona, ambaŭ rilatigantaj homojn al aliaj en plej vasta senco?

Ebleco eksci kaj proveti en *salono Saint-Martin* vendrede 9:00- 9:45.


\Matti Lahtinen.

# La LSG renoviĝas!

Ĵaudon, kadre de la Universala Kongreso en Montrealo, la Ligo de Samseksemaj Geesperantistoj (LSG) ĝojegas anonci ke, post longa periodo de neaktiveco, ni sukcese elektis novan estraron. Proksimume 50 homoj ĉeestis nian kunsidon, kaj post vigla diskuto, sinproponoj, kaj voĉdonado, nova estraro estas elektita. John Dumas (KN 314) estos la prezidanto, Susanne Roy (KN 76) estos la vicprezidanto, Jeremy Bass (KN 168) estos la kasisto, Harley Zukowski (KN 375) estos la sekretario, Gilles-Philippe Morin (KN 365) estos la redaktoro, Andrew Mathis (KN 258) estos la retejmajstro, kaj Martin Benoit (KN 450) kaj Didier Loison (KN 459) estos senofichavantaj estraranoj. Ni specife ĝojas ke ni sukcese trovis homojn el pluraj kontinentoj, genroj, kaj generacioj. Gratulon al la nova estraro!



La nova estraro de LSG



**Hodiaŭ:** 21˚, suna

**Vespere:** 17˚, sennuba



**Nokte:** 14˚, sennuba

**Morgaŭ matene:** 22˚, iom da nuboj

# Ŝanĝoj al la programo

## Eŭropo: Regionaj komisionoj

La kunsido okazos je 14:45-15:45 en la *salono Hodler,* laŭeble hibride, per Zoom:

https://us02web.zoom.us/j/88594069535

## KEA-kunsido

Kiel menciis Geoffrey Greatrex dum la Solena Malferrmo, la kunsido de la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) devas okazi en pli taŭga horo. Anstataŭ tagmeze, la KEA-kunsido okazos vendredon je la 15:00 en la sama loko, *Solis*. Bonvenon al ĉiuj.

## Kunveno de ATEO

Publika kunveno de ATEO (Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo) okazos vendredon, je 12:30-13:15, en la *salono Nanovszky*. La temo estos *Ateismo kaj religio en edukado kaj ŝtato,* kun ĉefparolanto Orlando Raola. Prezidos Brian Moon.

## Tanzanio — ĉu preta por UK?

La programero okazos je 13:45 - 14:30 en la *salono Hodler,* hibride.

## Situacio en Ukrainio — demandoj kaj respondoj

*Lapenna*, 14:50-15:40.

Venu por renkonti Eŭheno Kovtonjuk (honora prezidanto de la Ukrajinia Esperanto-Asocio), kiu estas preta respondi al vi demandojn pri la aktuala stato en Ukrainio. Kiel mem spertanta *je propra haŭto* la aktualajn teruraĵojn, li venos diskuti, priparoli kaj kundividi siajn spertojn kun la kongresanoj.

## Esperanto-USA — fermo

*Nourmont*, 13:45-14:30.

La fermo de la LK de Esperanto-USA. Ĉiuj estas bonvenaj.

## Asocio Nova Familio

*Solis*, 12:15-13:00, - prezento de la asocio kaj ĝiaj urĝaj informos pri la novaĵoj de la asocio kaj nia geonkla projekto. Prezentos estraranino Betti Maul.

## Aŭtora duonhoro: Petr Chrdle

*Saint-Martin,* 14:00-14:30